# HEJS JUNECO

HEJS
Hispana Esperantista Junulara Societo
Sociedad Juvenil Esperantista Española
Sol, 75
41003 - Sevilla
Tel. (954) 415991

februaro, 1987
n-ro 128

**NE RIDINDIGU VIN**



HEJS - JUNECO

Eldonas

Hispana Esperantista Junulara Societo

JUNULARA SEKCIO DE H· E· F· - LANDA SEKCIO DE T· E· J· O·

SOL. 75 E - 41003 - SEVILLA - HISPANIO

TFNO. (954) 415991

N-ro 128 / FEBRUARO, 1987

REDAKTEJO: Atocha 98, 28012 Madrid

DIREKTORO: Miguel Ángel Sancho Pardo

REDAKTAS: Ricardo Felipe Albert Reyna
Georgo Kamaĉo

# ENHAVO

1 KOVRILO
2 ENHAVO K.A.
3, 4 ijk en krakovo
5 HEJSAĴOJ ①
6, 7 DOKUMENTO DE L' JARCENTO
8 HEJSAĴOJ ②
9, 10 ijk en krakovo
11 HEJSAĴOJ ③
12 PROPONO POR JUBILEA DEVIZO


Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn, por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.

# 43a internacia junulara kongreso 17-24 julio 1987

# KRAKOVO (PL)



# ijk IJK



Unu semajnon antaŭ la 100-jariĝo de Esperanto komenciĝos la 43-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. La evento, kiu okazos en Krakovo (Kraków - prononcu: Krakuv) estos sendube unika ebleco renkontiĝi kun esperanta kaj pola kulturoj.

Krakovo estas facile atingebla aŭte, trajne, aviadile - kaj bicikle.

**La kongresejo**

Ni loĝos en du- kaj tri-litaj ĉambroj en studentaj domoj de la loĝkomunumo de Minist-Fandeja Akademio. La kongres-salonoj kaj -manĝejo troviĝas proksime de la loĝloko.

**Programo**

La temo de la kongreso estas: "Homo kaj civilizaciaj minacoj" La kongresanoj detale traktos ĝin en prelegoj, diskutoj kaj laborgrupoj.

Grava parto de la kongresa programo estos ligita kun la jubilea manifestacio. Okazos ankaŭ la kutimaj programeroj: teatra, internacia, balo, ...

Kadre de la kongressemajno okazos la 5-a seminario de TEJO kaj PSEK por Esperanto-aktivuloj, dediĉita al esperantologiaj temoj.

La kongresanoj povas elekti inter tri ekskursaj celoj:

- la belega ripozloko Zakopane en la Tatra-montaro
- la muzeo pri la dummilita koncentrejo en Oświęcim (germane: Auschwitz) - pruvo de terura murdado
- (la unika malnova salminejo en Wieliczka, kie inter alie troviĝas sala preĝejo kaj kuracejo) P.S.: Ne plu !!!

Post la IJK vi povas partopreni la 72-an Universalan Kongreson en Varsovio, okazonta inter la 25-a de julio kaj la 1-a de aŭgusto 1987.

# HEJS dum la 47a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

1

Junularaj Aranĝoj ...............

## AL GE-ĈIAJ JUNULOJ


............. Jorge Camacho
(t.e., Georgo Kamaĉo)


Madrido, de la 16a ĝis 20a de Aprilo 1987

★ 1887 – JUBILEA JARO – 1987 !!!

Kun la celo ne konkurenci kun la 47-a Hispana Kongreso de Esperanto, nek kun la UEA kaj TEJO-kongresoj okazontaj respektive en Varsovio kaj Krakovo, Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS) decidis ne organizi apartan junularan renkontiĝon en 1987, sed starigi Junularan Programon en la kadro de la nomita Hispana Jubilea Kongreso.

<u>LOĜADO</u> NE estos amaslogejo por gejunuloj.

En Madrido ekzistas du junularaj restadejoj (Albergues juveniles), por kiuj necesas aŭ la individua aŭ la grupa karto de la hispana reto de junularaj restadejoj (informuĝu ĉe la junulara oficejoj de la aŭtonomaj komunumoj). La prezo, inkluzivanta dormejon kaj matenmanĝon estas jen 425 pesetoj (por malpli-ol-26-jaruloj), jen 500 pesetoj por pli aĝaj personoj) ĉiunokte. La adresoj de ambaŭ restadejoj estas: (Bv. telefoni rekte al ili)

• Casa de Campo
Apto 11004
Tel: (91) 4635699
28011 Madrid

EMT-BUSO 33 «EL LAGO»

HALTEJO METROA: «SAN BERNARDO» «ARGÜELLES»

• Santa Cruz de Marcenado, 28.
Tel: (91) 2474532
28015 Madrid

La cititaj restadejoj estas malfermitaj dum la tuta jaro. La nombro de loĝlokoj estas respektive 118 kaj 77. Deviga horo por nokta reveno: ĝis la 11-a horo nokte.

<u>Manĝoj.</u> Ĉiu juna kongresano, kiu ne volos manĝi en la kongreseja manĝejo devos mem prizorgi siajn proprajn manĝojn.

# PROTOTIPO de HISPANA ESPERANTISTO

ENCIKLOPEDIETO HISPANA N-RO 1: LA HOM... / LA HE...




KLARIGOJ:

- ▨ Verda koloro
- [1] Distingilo de la verdberetuloj
- [2] Insigno de Ĉina Esperanto-Ligo
- [3] Ŝaŭmvino Esperanto
- [4] Diplomo pri "Hisperanto", la hispana E-dialekto
- [5] Eaj libroj
- [6] Nekompleta jarkolekto de EPĈ
- [7] "Don Quijote" (hispanlingve)
- [8] Kalendaro de ĈEL
- [9] Neceseja pordo
- [10] "Boletín" de HEF
- [11] "Funda... kaj lerno...

JUNULARA PROGRAMO

## 2

NUR 3 PROGRAMEROJ ESTOS LA OFICIALAJ HEJS-PROGRAMEROJ EN TIU ĈI KONGRESO. KIAL? LA CETERA KONGRESA PROGRAMO PLENUMOS LA DISTRAN, KLERIGAN KAJ INFORMAN ROLOJN TRADICIAJN EN ANTAŬAJ RENKONTIĜOJ DE HEJS. JEN TIUJ TRI ARANĜOJ:

| | | |
|---|---|---|
| Ĵaŭdo 16 aprilo | 20.00 horo | * HEJS sin prezentas |
| Vendredo 17 aprilo | 17.00 horo | -Ĝenerala kunveno de HEJS |
| Sabato 18 aprilo | 12.00 horo | -Kunveno de la estraro de HEJS kun ĉi ties komisionoj |

Atentu: * = publika kunveno
- = nur por junuloj


## KROME...

NI DISPONOS EJO(J)N (= ĈAMBRO(J)N) KAJ MURON POR SURMETI INFORMAN TABULON DE HEJS. PER ĜI NI ĈIUTAGE SCIIGOS PRI JUNULARAJ IMPROVIZOTAJ ARANĜETOJ, INTERALIEL PRI:

- Eventuala eldonado de kongresa junulara kuriero
- Fakaj kunsidetoj pri: informadiko, instruado, tradukado, verkado... (vi mem proponu tiam!).
- Kunsido pri IJK en Krakovo (kaj eĉ pri UK). Ĉi tie vi trovas multon da informoj. Pripensu, ĉu vi partoprenos, kaj kunportu ideojn por la IJK-programo (ekz. por la internacia vespero).

**ALIĜILOJN, INFORMOJN, ĈION AJN PETU DE** 47a Hispana Kongreso de Esperanto
Liceo de Esperanto, Atocha, 98, 4°, 28012 MADRIDO

Ne forgesu, ke ankaŭ pri noktaj-vesperaj diboĉoj k.t.p. ni kundecidos tiam. Georgo Kamaĉo



# ALIĜILO

## 43-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

JULIO 17-24 1987

KRAKOVO, POLLANDO

==========***==========

Aliĝilon sendu al:

Adreso de la Landa Kongresa Komitato: 43-a IJK-ESPERANTO, RU ZSP AGH, ul. Mickiewicza 30, 30-059 Kraków, Pollando, telekso: 0322203 AGH PL.

Pagoj (kun indiko: 43-a IJK - Krakovo) : al la Centra Oficejo de UEA/TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam :

- per via UEA-konto (se vi havas),
- al poŝtĝirkonto: 1572212 (UEA) Nederlando,
- al bankokonto: Bank Mees and Hope NV, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam, konto 25.52.89.804 .

==========***==========

## A L I Ĝ I L O

Mi aliĝas al la 43-a IJK (17-24 de julio 1987) laŭ la kondiĉoj kaj prezoj presitaj dorsflanke (plenigu klare, MAJUSKLE kaj latinlitere):

Familia nomo: ........................................ Naskiĝdato: ........../........../..........
(kompleta)

Persona nomo: ........................................ Sekso: ino / malino*

Kompleta adreso kun poŝtkodo: ..........................................................................................

..........................................................................................................................

Lando (en Esperanto): ........................................ Telefono: ........................................

Vegetarano: jes / ne* Fumanto: jes / ne*

Dato de aliĝo: ........................................ Subskribo: ........................................

Ne plenigu ! Por administrado.

| TEJO-membro | pago | konfirmilo | invitilo | vizo | 2-a informilo | 3-a informilo | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | |

## KOTIZTABELO (en nederlandaj guldenoj)

| aĝo je la aliĝdato | aliĝo ĝis | | | |
|---|---|---|---|---|
| | 87/01/15 | 87/04/30 | 87/06/30 | poste |
| ĝis 20 | 175 | 200 | 225 | 250 |
| ĝis 26 | 200 | 225 | 250 | 275 |
| ĝis 36 | 275 | 300 | 325 | 350 |
| pli | 340 | 365 | 390 | 415 |

La organizantoj ne antaŭvidas la kategorion "memzorganto".

*

- * Mi pagas laŭ ĉi-supra tabelo + ............Hfl
- * Mi estas individua membro de TEJO kaj rajtas je rabato de 20 Hfl - ............Hfl
- * Mi volas fariĝi individua membro de TEJO por la jaro 1987 kaj por tio mi pagas + ............Hfl
- * Mi volas subteni la kongreson per donaco + ............Hfl

Mi pagas sume = ________Hfl

*

* Mi bezonas polan vizon: jes / ne*. Mi volas ricevi ĝin en la pola konsulejo en

/lando kaj urbo/ : ..........................................................................

* Se eblos - mi volas loĝi kune kun : ..........................................................................

* Mi volas kontribui al la temo aŭ/kaj la programo de la kongreso per :

..........................................................................

* Mi volas partopreni kongresekskurson al : montaro/salminejo/Oświęcim-muzeo *

* Mi partoprenos 72-an Universalan Kongreson en Varsovio: jes / ne*

* Mi biciklos kun BEMI-karavano al la kongresurbo : jes / ne*

*

KONDIĈOJ :

*)La plena kongreskotizo rajtigas loĝadon, manĝojn kaj partoprenon en ĉiuj programeroj de la kongreso. *)Aliĝu nur senpere ĉe la LKK-adreso. *)Kiel aliĝdato validas la dato de ricevo de la kompleta pago. *)Via aliĝilo estas transdonebla al alia persono, sed ni alĝustigos la kotizon laŭ la aĝo de la anstataŭanto. *)Por partatempa ĉeesto ni kalkulas la plej altan kotizon en la respektiva aĝkategorio dividite per 7, multiplikite per la nombro de partoprentagoj. *) Se vi malaliĝas ĝis plej malfrue unu monaton antaŭ la kongreso, vi ricevos vian antaŭpagon minus 25 Hfl. *)Se vi pagas al la bankokonto bonvolu aldoni 9Hfl. *) Nur pagintoj, se necese, estos liberigitaj de la deviga monŝanĝo. *)IJK-partoprenantoj pli junaj ol 26 jaroj je la 1-a de la januaro 1987 rajtas senkoste aliĝi al la 72-a Universala Kongreso en Varsovio.

* - forstreku nevalidan

kaj 3

# PRI TIU ĈI NUMERO DE HEJS-JUNECO

PRIVATAJ PERSONAJ PROBLEMOJ MALEBLIGIS AL LA REDAKTEJANOJ PRETIGON DE PLI FRUA KAJ PAĜPLENA NUMERO. TIAL VI HAVAS INTER VIAJ MANOJ KVAZAŬ INFORMAN BULTENON.

SAMTIAL MI MEM NE KUNLABORIS REGULE KUN "*TEJO-TUTMONDE*". ĈI TIES ROLO ĴUS ŜANĜIĜIS, ĈAR ĜI NUN ESTAS **OFICIALA GAZETO DE TEJO.**

CETERE, EBLE INDUS HAVI BULTENON EN LA HISPANA / KASTILIA POR INFORMI JUNAJN NEESPERANTISTOJN.

**NU,** ĈU IU INTERESIĜAS PRI REDAKTAJ LABOROJ? PRIPENSU TRANKVILE. ĈION NI KUNDISKUTOS EN/DUM LA MADRIDA KONGRESO.

**ĜIS TIAM TIE!**

P.S.: NI KLOPODOS POR REDAKTI EGE KULTUROZAN NUMERON

Georgo Kamaĉo

# EN LA ABISMON!

